# *Venezuelo ricevas novan medicinan kargon el ?inio*



Karakaso, apr 13 (RHK) ?inio sendis al Venezuelo gravan kargon de rimedoj kiel kirurgiaj materialoj por protekto de la sanprofesiuloj, protektaj maskoj, gantoj, vestoj kaj okulvitroj protektaj, por tiuj laborantaj rekte en la atento al la pacientoj konta?itaj de Covid-19, la? informis Delcy Rodríguez, ekzekutiva vicprezidantino pere de sia socia reto en Twitter elde la internacia flughaveno de Maiquetía, en la ?tato Vargas.

?i klarigis ke “alvenas pli ol  30 tunoj da materialoj kadre de la kunlaboro inter ?inio kaj Venezuelo kaj  tiu ?i aerponto de humanitara asistado”.

Inter la ricevitaj materialoj estas 15 mil testiloj PCR por fortigi la procezon de ampleksigita kaj personigita enketado.

La funkciulino asertis ke la ?inaj kunlaborantoj povis mem atesti pri la ekzemplodona agado de la venezuela registaro de la prezidento Nicolás Maduro kaj pri la sinofero de la popolo, kiu tre discipline plenumas la kvarentenon.

Tiu ?i estas la dua kargo de medicina kunlaboro sendata de ?inio al Venezuelo. La unua alvenis la 28-an de marto kun 55 tunoj da teknika kontribuo.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/219600-venezuelo-ricevas-novan-medicinan-kargon-el-cinio

**Radio Habana Cuba**